# ENA INFORMILO

ESPERANTISTA NATURKURACISTA ASOCIO

VINTRO 1988 N-RO 2

## ENA

Ĉi tiu Asocio estis fondita en 1986. Ĝi ne intencas konkurenci, kvankam ĝi ne estas facile digestebla ĉe multaj. Eble ties kaŭzo kuŝas en la nescio pri kio precize temas. Temas fakte pri la agnosko kaj la intenco disvastigi la NATURMETODAN KURACADON. La celo ne estas flankenmeti la kutiman, ordinaran, kuracsistemon, kvankam oni bone scias ke kelkfoje ordinara drogo, anstataŭ ol kuraci — kaj eĉ kiam ĝi kuracas — okazigas aliajn malsanojn precize kaŭzitajn de la sama farmaciaĵo intencanta kuraci.

La naturmetodaj kuracistoj, estante kontraŭ superemo, favoras toleremon kaj kunekziston. Ilia nura intenco kaj klopodo estas: HELPI LA NATURON KURACI, ne anstataŭigi la naturan laboron.

Manŝele do la celo de ENA estas la jena:

a) interligi fakulojn kaj interesulojn pri naturkuracado kaj interŝanĝi informojn pri la temo;
b) veki intereson pri naturkuracado ĉe Esperantistoj;
c) veki intereson pri Esperanto ĉe tiaj neesperantaj fakuloj.

La Asocio publikigas al novaj membroj sendas ateston kaj membrodiplomon kontraŭ la membrokotizo de almenaŭ unu dolaro(aŭ egalvaloro) pojare.

Estu membro de ENA ne nur naturkuracistoj mem, sed ankaŭ interesuloj kiuj dezirus scipovi kaj malkovri la enhavon de la naturmetoda kuracado. Petante informojn, bv aldoni respondkuponon por la respondo. Bv diskonigi ĉi tiun anoncon-informon. Dankon.

# ENA — INFORMILO

estas la organo de Esperantista Naturkuracista Asocio, fondita en 1986. La organo aperas kvar fojoin laŭsezone. La jara kotizo por ENA — aliĝu en iu ajn monato — estas US$ 1:00, kaj nepagipovaj landanoj povas sendi egalvalorajojn kiel kotizojn. Membroj rajtas ricevi la organon senpage. La jarabonojn, artikolojn por organo kaj aliajn demandojn akceptas Ĝ. Sekretario Puramo CHOHG, C.P.O. Kesto 3047 aŭ 4258, Seoulo, Koreio.


Prezidanto: D-ro Carmel Mallia
89, Triq is-Santwarju,
Zabbar, MALTA.

Sekretario kaj Kasisto: D-ro Puramo CHONG
C.P.O Kesto 3047
SEOUL 100,
KOREA

Tel: (02) 687-8413 (Kliniko)
(02) 686-7923 (Hejmo)


---

## ENHAVO


3. Flanke de la prezidanto
4. Jarraporto de sekretario por 1988
5. Konservu vian sanon
6. Kiel kuracas la Naturista Medicino
8. Natrum Muriaticum
10. Natur - kuracado kaj Preventado de Hemoroidoj
11. Recepto de s-ro Ivan Iliev Cervaev
12. De AIDS ĝis SIDS
14. La Efiko de Kanabo
15. Membroj sinprezentas
16. Membrolisto de E.N.A.


---

# FLANKE DE LA PREZIDANTO



Carmel Mallia


Prezidanto de ENA

Karaj membroj de ENA,

Jen ni denove interligiĝas pere de ĉi tiuj modestaj paĝoj. Oni ankoraŭ serĉas la vojon al pli stabila kunlaborado inter ni. Sekve, do, bv. sendi al ni viajn ideojn por realigi pli glatan rilaton. Intertempe memoru ankaŭ kiom kostas la letersendado por tiuj, kiuj ĉiam petas respndon al siaj leteroj. Kelkfoje ja temas pri bagatelaĵoj.
Se vi povas ankaŭ proponi personajn spertojn rilate al la naturmetoda kuracado, ne hezitu sendi ilin por aperigi en nia organo.

Ĉiu komenco estas malfacila, sed kun iom de ĉiuflanka bonvolo, oni certas ke, post kelkaj ŝanceloj, nia ENA glate funkcios. Helpu do tiurilate. Dankon kaj salutojn elkorajn.
La prezidanto.

ena ESPERANTISTA NATURKURACISTA ASOCIO



# Jarraporto de Sekretario por 1988

Ĝ.Sekretario Puramo CHONG

En la jaro 1988 sekretario sendis leterojn al membroj de E.N.A. du foje; la 2an de Marto kaj la 20an de Junio.
Multaj el niaj gemembroj respondis al tiuj leteroj kaj montris siajn opiniojn per respondoj. Jen la rezultoj;

## *Pri la planita unua kunsido de E.N.A*

Multaj membroj principe konsentis okazigi la unuan kunsidon de E.N.A. enkadre de Roterdama U.K., sed montriĝis, ke nur tri membroj de ni partoprenis en U.K., kaj tiel fine ne okazis la kunsido.

Do, oni devus refoje konsideri la okazigon de la kunsido en la sekvanta jaro, 1989 okaze de Brajtona U.K. en Britujo.

Ni pensas, ke 5–10 estos sufiĉa nombro por ni havi la kunsidon je la nomo de E.N.A. dum Brajtona U.K. kaj do ni vidos, kiom da membroj inter ni aliĝos al la U.K.

## *Pri la organo, E.N.A.–informilo*

Kvankam estraro planis eldoni organon du fojojn en la jaro, montriĝis tamen, ke tio estas ĉi stadie ankoraŭ malfacila pro multaj problemoj, ekz. ekonomia cirkonstanco, manko de manuskriptoj ktp.

Tiu ĉi numero tamen, vi vidas, estas eldonita kun pli multiĝinta enhavo ol la antaŭa. Sekretario ĉiam atendas la manuskriptojn de niaj membroj kaj esperas laŭ la cirkonstanco plurfojojn eldoni en proksima estonteco.

## *Pri la jarkotizo*

En la dua letero, datita de la 20 de Junio, sekretario unuflanke decidis plialtigon de la jarkotizo de 1 al 2 usonaj dolaroj, konsiderante la eventualajn poŝtelspezojn kaj eldonprezojn de organo. Ĝisnun 18 gemembroj el 40 jam estas pagintaj la kotizojn. Iuj sendis papermonojn aŭ ĉekojn kaj aliaj per respondkuponoj, poŝtmarkoj ktp.

Plej dezirinde estas rekte sendi al ricevanto dolaran papermonon eniginte en la koverton kun letero, tiel ke la ricevanto facile povas trovi kaj uzi. Ĉar la ĉeko por la sumo, du dolaroj, estas tro malgranda por viziti

bankon, kaj alilandaj valutoj estas ofte malfacile ŝanĝelaj. Oni povas sendi 4 respondkuponojn, kiuj egalvaloras kun 2 usondolaroj.

## *Pri enketilo*

Por pli efektive administri gemembrojn, sekretario petis en la lasta dua letero plenigi enketilon kaj resendi ĝin; el distribuitaj enketiloj nur ok revenis al sekretario. Ni ankoraŭ atendas ne atingintajn enketilojn. Tuj sendu enketilon, ni petas.

# KONSERVU VIAN SANON

**C.Bopis Eston el Brazilo**

## *A. La 5 Sanigaj Praktikoj*

1. Saniga nutraĵo, bona maĉado,
2. Matena fekado.
3. Ripariga dormo.
4. Ĝenerala korp–ekzerco.
5. Intern–paciga jogo k viv–normoj.

/Vivu korekte k ĉiam serĉu la veron/

## *B. La 5 Esencaj Nutraĵoj*

1. *Legomoj.*
2. *Fruktoj.*
3. *Cerealoj (grenoj).*
4. *Viando–2–foje semajne.*
5. *Pura akvo.*

*/Plengrajna/*

## *C. La 7 Venenoj /La prezo de la civilizo/*

1. *Grasaĵo (kolesterolo, sklerozo).*
2. *Salo (urin–organara inflamo)*
3. *Sukero (diabeto, koro)*
4. *Vinagro, mustardo kc. (toksikaĵo, koagulas /kazeigas/ la sangon).*
5. *Lakto (kalciigo de la artikoj k vertebroj)*
6. *Alkoholo, kafo, fumado··· (toksikaj stimulaĵoj)*
7. *Tomato, pipro··· (toksikaj spicaĵoj)*

*/kuiru en pura akvo/.*

*Uzu herb–bolaĵon···*

Jen ni aperigas la parton de la verko de d-ro Jaime Scolnik, el "Kiel Kuracas la Naturista Medicino" eldonita en 1961 de Ano-Akademio. La artikolo serie daŭros ankaŭ en la venontaj numeroj - el Redakcio

# Kiel Kuracas la Naturista Medicino

D-ro Jaime Scolnik

## Tri Terapiaj Sistemoj

[1]Celante sian feliĉon, la homo de ĉiuj tempoj serĉis formon eviti malsanon kaj kuraci ĝin, kiam ĝi estiĝis.

[2]En diversaj landoj kaj dum diversaj epokoj aperis pluraj terapiaj sistemoj, sed ni limigu nin ĉi tie nur al la tri precipaj : la alopatio, homeopatio kaj la naturismo.

[3]La alopatia medicino estas tiu, kiun oni oficiale instruas en la universitatoj kaj estas praktikata de la plimulto de la kuracistoj. [4]Ĝia celo estas batali kontraŭ la simptomoj, kiujn prezentas la malsanulo per, rimedoj kontraŭaj al ilia naturo (contraria contrariis curantur). Ĝi konsideras la mikrobojn kiel kaŭzantojn de preskaŭ ĉiuj malsanoj.

[5]La homeopatia medicino, kreita de la germana kuracisto Kristofo Federiko Hahnemann (1755 - 1843), estis reago kontraŭ la oficiala medicino alopatia. Ĝia sistemo konsistas en la aplikado al malsanoj en minimumaj (infinitezimaj) dozoj de la samaj substancoj, kiuj en pli grandaj kvantoj estigus ĉe sana homo simptomojn similajn al tiuj, kiujn oni intencas kontraŭbatali (similia similibus curantur—per similajoj oni kuracas similajojn). [6]La homeopatio, malgraŭ ĝia signifoplena progreso, tamen ne plenumis la aspirojn de ĝia kreinto kaj ankoraŭ malpli tiujn de la suferanta homaro. La

graveco, kiun la homeopatio por ni havas, estas nur laŭ historia vidpunkto, ĉar ĝi estis la unua baro kontraŭ la eksesoj de la alopatio kaj preparis la terenon por la reapero de la naturista medicino. Oni povas ĝin konsideri kiel ponton de transiro inter tiuj du sistemoj.

[7]Finfine ni havas la naturistan aŭ naturan medicinon, kies origino perdiĝas en la nokto de la pratempo. La unua homo, en sovaĝa stato, iras nude tra la mondo kaj obeas nur la voĉon de sia instinkto, ankoraŭ ne falsita de la civilizacio ; li ĝuas sanon, kiun ni povas nomi perfekta, kaj aktuale nur komparebla kun tiu de la sovaĝaj bestoj. [8]Kiel ĉi tiuj, la prahomo ne konis aliajn malsanojn, ol la vundojn ricevitajn dum la luktoj kontraŭ aliaj bestoj aŭ naturkatastrofoj. [9]Ni povas konjekti, kion la loĝanto de la kavernoj faris por sin kuraci en tiuj okazoj. [10]Li ne posedis antisepsaĵojn, nek bandaĝojn, nek kuracistojn, nek apotekojn. Ĉu li pro tio troviĝis senprotekte ? Tute ne. La tuta Naturo estis preta por lin helpi. [11]Tie li trovis je lia atingebleco la freŝan akvon de la fontoj kaj riveretoj por lavi siajn vundojn ; poste li kovris tiujn ĉi per ŝlimo el la riverbordo, kaj li fine kuŝiĝis kaj elmetis sin al la sunaj radioj. [12]Kaj jen tio kio estas ankoraŭ pli grava : li ĉesis manĝi, apenaŭ ensorbis iom da akvo. [13]Tiamaniere li pasigas la tagojn kaj la eĥko de la fasto kune kun la efiko de la suno, de la akvo kaj de la patrino-tero kvazaŭ mirakle kuracas la plej gravajn vundojn, eĉ pli bone ol ĝin farus famkonata kirurgo hodiaŭa per sia arsenalo da instrumentoj kaj drogoj.

[14]Kia terapia sistemo estis tiu, kiun la prahomo aplikis ? La natura. Naturismo pura ! La sama sistemo, kiun hodiaŭ posedas la bestoj de la arbaroj, malproksime de aziloj, hospitaloj, frenezulejoj kaj klinikoj, kaj kies enviinda sano nur tiamaniere estas eksplikebla.

( daŭrigota )

# NATRUM MURIATICUM

## *(aŭ Natr. cloratumsalo)*
## *laŭ la homeopatia sistemo aŭ kurac–arto*

**Manoel Blaz Garcia–Brazilo**

## *Patogenezo k indikoj*

Profunda kuracilo de la nutrado, k kompona elemento de ĉiuj likvecaj k solidaj partoj de la homa korpo; ĝi reguligas la humidecon ene de la ĉelaro aŭ histo.

Ĝi estas medikamento utila en la kazoj de maldikeco kun la kolo maldika, kvankam la malsanulo manĝas bone. Anemio, soifo konstanta, mallakso (konstipacio), atrofio, kapdoloro, dispepsio, kronikaj singultoj, marasmo de l'infanoj. La malsanuloj de Natrum mur. estas melankoliaj, ploras facile, frostosentemaj, sen viveca energio, tamen ili serĉas aeron freŝan k sentas sin malkomforta en fermita ĉambro; ili ne sentas plezuron pro ia ajn afero, estas splenaj, tristaj, senpaciencaj, malviglaj; ne volas konsilon, kareson, do preferas solulecon. Tiu ĉi sanostato ofte manifestiĝas en la knabinoj dum ŝiaj menstruoj. La pacientoj ne ŝatas manĝi panon, nek la grasan nutraĵon.

Rekomendita al infanoj kun atrofio de l'kolo–atrofio kun ega apetito. Cerba laciĝo, doloro en la femuro; leŭkocitemio, harpuno en lieno, marasmo, soifo kaj deziro por salo. Malalta tensio, pulso rapida. Kelkaj formoj de neŭrastenio. Alia indiko estas: marofobio, t.e., persono, kiu ne bonfartas ĉe la maro aŭ ne toleras vivi ĉe l'maro.

La fekaĵoj estas sekaj, malmolaj, sed povas prezentiĝi dum kelkaj okazoj diareoj. kapdoloro pro la tro vidad–uzado. Kapdoloro de studentoj, lernanto. Kapdoloro kongesta, fluktuanta, eksploda, martelanta, precipe post la menstruo. Ĉiuj simptomoj de Natr. mur. pligraviĝas de la 9a ĝis la lla h. matene–ĉefe la cefalalgio k la intermitaj febroj, malario.

Profunda ago koncerne al metabolaj procedoj pri nutrado–limfa sistemo, sango, hepato, lieno, ĉelaro. Natrum mur. estas grava mineralo por la tuta organismo, varmohava k stimula efikanto.

Alia utila apliko en kliniko: Menstruo mankanta, kiu ne venas aŭ ne sufiĉas. Melankolio okaze de monataĵo, same kapdoloro. Sento de ardeco

post la urinado; ardeco en anuso post la fekado k pikdoloro en la rektumo. Inflamiĝo de vagino, ardeco en utero, juko; akveca k troa leŭkoreo. flua k obstina, hipersekrecioj; aŭ male, la nazo povas prezentiĝi obstrukca k varma. La lipoj k la lipanguloj fendiĝas. Salivo akveca k sala. Perdo de la flarsento, ne flaras bone, nek gustumas.

Kuracas naŭzon, ruklojn, flatulencon, dispepsion, mallakson. Kaj okulafekciojn: astenopion, amaŭrozon, ambliopion.

Natrum mur estas efika por kelkaj malsanoj de la haŭto: Akno, herpeto sur la vizaĝo k nuko; inflamo de la supera lipo; verukoj, veziketoj. Pala haŭto, pala vizaĝo, oleeca haŭto. Alopecio, harfalo. Ulceretoj en la buŝo; formiksento en la lipoj. Lango sekeca k geografia. Povas prezentiĝi ankaŭ salivado. Perdo de la gustumado. Dentodoloro. Doloro k frida sento en la dorso k la lumbo k la sakro. Folikla k kronika inflamo de la gorĝo, malbona englutado. Kronikaj singultoj. Personoj forgesemaj, ne kapablas pensi. Malbonaj rezultatoj de masturbado. La ungoj estas malsanaj, malmolaj k malgluiĝas, precipe je lavistinoj. Kaloj k dikeco en la haŭto. Taŭgas ankaŭ por personoj, kiuj sonĝas pri rabisto(j), sonĝoj afliktantaj, angoraj. Konvulsietoj, pulsado sentebla ĉie. Malbona efiko pro misuzo de kinino, Diabeto (precipe sensukera); skorbuto, kropo k tiroido. Hemoroidoj k fendoj ĉe l'anuso; malforteco de la kruroj. Dormeco de l'lango, sento de haro sur la lango. Infanoj, kiuj komencas paroladi malfrue.

Oni vidas, ke Natr. mur. ampleksas egan aron da simptomoj k povas kuraci plurajn malsanojn. La preparado de tiu kuracilo ne estas malfacile, sed postulas paciencon k tempon. En nia kuirejo ofte troviĝas salo. Oni metas, ekzemple, 99g da akvo (kiu estas la vehiklo por la kiluoj) k lg da salo. Ferminte la botelon, oni skuas ĝin forte, agitas ĝin ĉirkaŭ cent foje. Oni povas uzi pli malgrandajn kvantojn. Bone, se ni jam faris tion, ni havas la unuan dinamizon de salo (t.e.: Natrum mur. Cl). Sekve, ni procedas ĉiam same: Ni prenas unu parton de tiu dinamizo k metas ĝin en flakonon kun 99 partoj da akvo pura. K faru la samon, ferminte la flakonon, denove skuu 100 foje, forte, por ke ĝi miksiĝu bone. Tiel farite, vi jam tenas la duan dinamizon. Daŭrigu la saman proceddon ĝis la kvina dinamizo. Tiam, vi havos la konvenan diluon de salo Natr. mur. C5 por kuraci korizon, kapdoloron, okulmalsanojn k cetere. Prefere, uzu distilitan akvon. Tamen se vi ne kapablas dinamizi la salon, vi povos ĝin aĉeti en homeopati–apoteko. Al kronikaj afekcioj povas trinketi 5 gutojn;por infanoj 2 gutojn. 3–foje tage

# NATUR–KURACADO KAJ PREVENTADO DE HEMOROIDOJ.

Graziano RICAGNO
kuracisto faka pri infan–neurologio
ĉe Itala Nacia Saniga Organizaĵo

En Italio estas malfacile renkonti homon, kiu ne suferas aŭ suferis pro hemoroidoj; ĉu ankaŭ en viaj landoj?

Interesaj estus komparo kaj kompreno de kaŭzo de eventualaj malsimilecoj!

Hemoroidoj (internaj aŭ eksteraj) konsistas, kiel sciite, je dilato ĉe la rekta intesto de venoj, tio estas varikoj, kiuj doloras propramove aŭ dum kaj post fekado, iufoje ankaŭ pro rompiĝo kun hemoragio. Likado de sango el hemoroidoj, kiam estas grava, povas anemigi pacienton (atentu!)

Ne temas pri hereda malsano sed foje hemoroidulo havas gepatrojn aŭ geavojn suferantajn aŭ suferintajn pro tiu malsano.

Niaj ĉefaj hemoroidigantaj malamikoj estas konstipo kaj malmoleco de fekaĵoj, kiujn oni devas eviti por preventado kaj kuracado.

***PREVENTADO***: Necesas surtute ne tro sida viv–sinteno kaj ekvilibra, taŭga nutrado per la plej eble naturaj nutraĵoj, riĉaj je brano (integraj cerealoj), legomoj (kuiritaj aŭ ne), per malmulte da sukero, da kafo, da kakao (aŭ similaĵoj) kaj da alkoholaĵoj.

***KURACADO***: Se manĝaĵoj ne sufiĉas, necesas aldoni kuracadan agadon. Favoras intestan funkciadon kaj malfavoras konstipon ĉiumatena sinsekva trinkado de du glasoj da akvo (malvarma aŭ varmeta, ne frosta nek varma), ĵus vekiĝitaj kaj ne manĝinte post la antaŭa vespero. Favoras efikon de akva trinkado la reenlitiĝo dum duona horo. Ofte post tiu duonhora ripozo oni fekas.

Utitlas ankaŭ ĉiutaga manĝo de kuiritaj fruktoj.

Ne sufiĉintaj tiuj–ĉi kuraciloj, oni povas aldoni ne–oftan manĝadon de unu aŭ du kuleroj da vegetalaj mucilagoj (plantago ovata, tamarindo ktp), kiuj, laŭ mia scio, ne estas prepareblaj hejme, sed en Italio aĉeteblaj ĉe apoteko aŭ herb–vendejo.

Malgraŭ tiu–ĉi zorgado okazas ke tamen fekado estas malfacila (ekzemple pro doloro). Ĉi–okaze necesas plifaciligi transiron de intesta enesto, uzante klistereton (ĉirkaŭ 200 ml) formitan de miksitaj varmeta akvo kaj oleo el semoj aŭ olivo, 50% po unu (ŝmira sistemo) aŭ dilatigi rektan

inteston per klistereto de 200 ml de varma (ne tro) akvo, entenita almenaŭ dum dek minutoj antaŭ fekado.

Tiuj-ĉi naturaj metodoj estas konitaj en mia lando por kuraci hemoroidojn; ne ĉiuj metodoj efikas ĉe ĉiuj pacientoj, sed tre malfacile oni ne havas bonrezultojn almenaŭ el unu el ili; necesas ke ĉiu eksperimentu por trovi sian pli taŭgan vojon por kuraciĝi. Tamen, temante pri laŭnaturaj metodoj, oni ne timu malfavorajn ne-ekologiajn sekvaĵojn.

Notinde ke se hemoroidoj ne estas primaraj sed simptomo de alia malsano (ekzemple suferado pri hepata sang-cirkulado, ktp), resaniĝo de varikaj rektaj problemoj kunligiĝas kun kuracado de la ĉefa malsano.

# RECEPTO DE s-ro IVAN ILIEV ĈERVAEV el Sliven, Bulgario

Laŭ profesio mi estas juristo.

Miaj praavino, avino kaj patrino kolektis, rikoltis kaj praktike uzis la drogojn por si mem kaj por la malsanuloj.

De ili mi heredis tiun konduton al la naturkuracado.

De post majo antaŭ lastjare, mi komencis mian 76-an jaraĝon. Ĉiam kiam mi malsaniĝis, mi uzis nur naturkuracilojn. Ĝis nun mi neniam malsaniĝi s pro hipertensio, sed ĉiprintempe pro nerva ekscitado mi eksentis kapturniĝon.

Ĉe la kontrolo, la aparato indikis hipertension 190/90.

Jen mia recepto, per kiu mi normaligis mian sangobildon:

(1) 10-12 freŝajn aŭ 15 sekajn nuksajn, aŭ juglandajn, foliojn;

(2) 10-12 kariofilojn-spicaĵojn (ne florojn!);

(3) krenoradikon (egalkvanton sufiĉe raspitan).

Oni dekoktas en 0,5 da akvo ĝis kiam la konsistaĵo restos duone; oni malvarmigas ĝin, dolĉigas per mielo, kaj prenas la kuracilon po unu supa kulero 3-4 foje potage, duonhoron antaŭ la manĝo malsate. Se post alpreno de unu dozo, la efekto estas nekontentiga, se la hipertensio estas pli ol 200, la dozon oni devas ripeti. La kuracilon mi jam ekuzis sukcese multfoje.

## DE A.I.D.S. ĜIS S.I.D.S. (Originalo)

Hubert M.Schweizer, Goethestr. 16, D–7768 Stockach

Meze de la jaro 1983 mi prezentis ĉe la Internacia Medicina Esperanto-Kongreso en Ĉekoslovakio aktualan referaton pri homoseksualeco kaj a.i.d.s. Laŭ recenzantoj la temo estis "ekstreme interesa", "konsiderinde informa", "nekredeble nova", sed ankaŭ "dank' al Dio en orienta Eŭropo ankoraŭ ne konata" kaj "atesto de socia malbono en okcidento". La plimulte pozitiva eĥo daŭras plu en leteroj kaj citaĵoj - kaj la prelego restas plue science valida. Kion la medicina fakgazetaro, ĵurnalistiko kaj televido ĝis hodiaŭ plie alportis, tion mi registris kaj prilaboris pli sube, kompletigante la prelegon je la stato de decembro 1983.

En Usono 2000 a.i.d.s.-malsanuloj estas ĝis nun registritaj, en okcidenta Germanio 40 (novembre estis en kliniko 14 en Munkeno, 7 en Frankfurto, 6 en Berlino kaj 8 en Hamburgo), en Svisio 20. Informriĉajn tabelojn prezentis la scienca redakcio de la franclingva Svisa Televido komence de novembro 1983:
10 el la 20 a.i.d.s.-kazoj en Svisio koncernas samseksemulojn,
5 afrikanojn kaj 5 aliajn.

Tutmonde la a.i.d.s.-pacientoj estas grupigitaj jene:

| | |
|---|---|
| samseksemuloj | 55 % |
| afrikanoj | 25 % |
| haitianoj | 5 % |
| tokso-maniuloj | 3 % |
| hemofiliuloj | 2 % |
| aliaj | 10 % |

Alia listo indikas jenajn kontaĝ-originojn:

| | |
|---|---|
| Usono | 30 % |
| Centra Afriko | 25 % |
| Haitio | 8 % |
| Eŭropo | 15 % |
| sangotransfuzo | 2 % |
| aliseksemuloj | 18 % |
| aliaj | 2 % |

Laŭ "Paxiskurier" de la 14a de septembro 1983 la usonaj tribunaloj estas inundataj de ondo de procesoj, ĉe kiuj a.i.d.s.-viktimoj riproĉas al siaj seks-partneroj ke ili infektis ilin. Transfuzo-ricevintoj akuzis bankojn de l'sango pro tio ke ili malsaniĝis je a.i.d.s. sekve de transfuzo de sango.

Kontraŭ tio ŝajne apenaŭ zorgigas la fakto, ke 50% de la amerika loĝantaro estas infektita de toksoplasmoj (laŭ "Press Release Stanford University Medical Center - News Bureau", 1983-06-13). - La fenomeno a.i.d.s. ĉiukaze damaĝis en Usono la homoseksualan movadon: Samseksemuloj jam ne plu rajtas eniri multajn naĝejojn (laŭ Praxiskurier, 1983-11-09, H.V.). La afero memorigas la proverbon pri la infano forfluigita kune kun la bano!

Laŭ la septembra numero de la perioda gazeto "Forumo", aperanta en ILo, la registaro de Haitio akuzas, ke la interrilatigado de a.i.d.s. al Haitio fontas el rasismo. Homoseksualaj usonanoj estu elpelataj (el Haitio), Haitio ne toleru deflankiĝon de la seksa konduto.

La brita revuo por kuracistoj "Lancet" intertempe raportis pri la kazo de eksa monakino, kiu ĝis 1979 laboris kiel sociala laboristino inter geprostituitoj en Haitio kaj antaŭ nelonge mortis je a.i.d.s. en Kanado, sen ke tiu malsaniĝo povis esti atribuita al sekskontakto, narkotaĵoj aŭ sangotransfuzo. Laŭ la kanadaj kuracistoj la ununura riskofaktoro estis Haitio, kie la imuneca malsano jam estis disvastiĝinta antaŭ ol la unuaj malsaniĝoj ĉe viraj samseksemuloj estis raportitaj. Kontraŭe "New England Journal of Medicine" plej laste informis ke la unua a.i.d.s.-kazo en Haitio, en julio 1978, aperis ne antaŭ la unuaj infektiĝoj ĉe usonaj samseksemuloj. Laŭ studo, el 60 a.i.d.s.-malsaniĝintaj haitianoj proksimume 90% intertempe mortis en aĝo inter 15 kaj 65 kun la riskofaktoro "sam- kaj biseksualeco".

En la londona "St. Mary's Hospital" oni efektivigis medicinajn analizojn pri a.i.d.s. ĉe 100 sensimptomaj samseksemuloj: 35% havis tro malmulte da limfocitoj, 40% havis reduktitan proporcion de helpaj al T-limfocitoj subpremaj, 15 havis ambaŭ difektojn. 25% havis absolute tro malmulte da helpaj T-limfocitoj, 10% havis difektajn monocitojn, 25% havis perturbitan fagocitadon: laŭ raporto de "Lancet" 1983, 126-129.

Intertempe la esploroj sin fulmorapide intersekvas: en FR Germanio stimulaj premioj estas anoncitaj por la jaroj 1983, 1984 kaj 1985 ("Praxiskurier" de la 19 de oktobro 1983). Jam konstatiĝis (Helm/Frankfurt), ke a.i.d.s.-pacientoj ĉiam estas tuberkulin-negativaj, eĉ ĉe tuberkuloza infekto.

Francaj virusologoj de la instituto "Pasteur" en Parizo supozas, ke ili malkovris novan "retroviruson", pri kiu ili raportis ĉe simpozio pri a.i.d.s., meze de septembro en Cold Spring Harbor/Novjorko. Ilia teorio estas ke ripetitaj infektiĝoj malfortigas (!), kaj ili menciis kiel pruvon 6(!) aktivajn samseksemulojn kun alta grado de promiskuado. La fama Harvard-Universitato eĉ demonstris ĉe simioj la a.i.d.s.-infekton pere de limfaj enfiltraĵoj. ("Lancet" 599-602, 1983) Fine d-ro Gallo de la "National Cancer Institute" Bethesda/Marilando deklaris en Romo ĉe intervjuo por "Praxiskurier", ke japanoj eble estas imunaj kontraŭ a.i.d.s.-virusoj (Praxiskurier, 1983-10-19).

Kontraŭe la "New England Journal of Medicine"/Bostono samtempe raportis pri duboj, ĉu virusoj ekscitas a.i.d.s-on kaj informis samkiel prof. d-ro Yamazoe en la decembra numero de "Medicina Internacia Revuo"/Tokio, ke konjekteblas funga infektado laŭ la modelo de ciklosporino, iu metabola produkto de en Norvegio malkovrita fungo, kiu ĉe organtransplantado estiĝas por subpremi la defendadon de la propra organismo kontraŭ la fremda organ-substanco.

Pli precize pri tio neniu scias, tamen asidue misterapiiĝis – kaj jam a.i.d.s. estas komparita kun la arbara mortado, ĉe kiu antaŭvideblas ankaŭ kolapso de biosistemo, kiel ankaŭ kun s.i.d.s., "sudden infant death syndrome", la sindromo de subita morto infana, de kiu laŭ takso de Aĥenaj medicinistoj nur en Okcidenta Germanio kaj en la lasta jaro 2000 ĝis 4000 estis viktimoj, per spirmalfunkcio proksimume sep semajnojn post enspirado de industria smogo. Kiaj koneksoj!

A.i.d.s. ĉiukaze estis trogravigita, deklaris prof. Deinhardt en la dua septembra semajno ĉe la perfektiga kongreso de la germana federacia kuracista ĉambro en Merano. Kial?

1984–01–01

Adreso de la aŭtoro; H. SCHWEIZER, Goethestr. 16, D-7768 Stockach FRG

ALDONO: Japana ĵurnalo "Asahi" (1984 aprilo 25) denove aperigis novaĵon pri A.I.D.S., ke d-ro Gallo k.a. de usona "National Cancer Institute" raportis la 23-an de aprilo pri konstato de kaŭzanto de A.I.D.S.. Laŭ ili ĝi estas viruso HTLV-tipo III, ĉar 88% de A.I.D.S.-malsanuloj havis antikorpon kontraŭ tiu ĉi viruso. Ili ankaŭ sukcesis en izolado kaj amaskulturo de la viruso. (HTLV= Human T-cell Leukemia Virus).

S. Yamazoe

el *MIR Vol. 11-a, N-ro 1*

# La efiko de Kanabo

Prof. D–ro GODWIN L. OBOH el Nigerio

Kiel la difino de P.I.V. Kanabo estas alta herbo el familio Kanabacoj, el kies fadenoj oni faras ŝtofojn, teksaĵojn aŭ ŝnurojn.

Hispane oni nomas ĝin Marijuana aŭ Latinamerike Canavis Sativa. Oni uzas la kanaban herbon por naturakuraci diversajn malsanojn de glaŭkomo, okula malsano, dorma malsano, velkantaj haroj, gonoreo, alta sangopremo, vomito, diareo, tuberkurozo, denta malsano, stomatologio, kaj aliaj korpaj malsanoj.

La Kanabacoj aŭ cindro de Kanabo kuracas vundon je korpo. De antikve la kanabo estas herbo de pura amikeco, paco kaj disvolviĝo. La ŝtofo venkas malvarmon, febron kaj preventas perdon de apetito, Oni sekas la kanaban herbon kaj fumas ĝin kiel cigarojn en diversaj landoj de la mondo. La Kanabo estas nature fama energiilo pro ĝia antibiotika efekto.

# Membroj Sinprezentas

S-ro Josifa Rabino (1926.27.Oktobro)

Adreso : 24,Wingate Ave.- 3 533 HAIFA
ISRAELO
Profesio: Flegistino (Estinta) - DIETIKO PREZGARDANTA
Koncisa Kariero: De 18 jaroj prelegantino pri dieto ce "PREZGARDANTOJ" (Malpezigi kaj gardi pezon ĉe korpulentuloj per dieto saniga)

D-ro Carmel Mallia (1929.9.Novembro)

Adreso: 89 Triq is-Santwarju,ZABBAR,
Malta
Profesio: Sanitara Inspektoro
Koncisa Kariero: Verkisto,Poeto, Esperantisto,Doktoro pri Naturokuracado,ne praktikante ĝin

S-ro Peco Najdenov Vlahov (1946.24.Februaro)

Adreso: 5500 Lovec Lenin-XXV-31,Bulgario
Profesio: Helpanta Kuracisto
Koncisa Kariero: Interesiĝas pri Natura vivmaniero,Akupresuro, Masago,Jogo,Radiestezio, Spiritevoluo de la Homo k.a.

Prof.D-ro Godwin Oboh (1955.4.Decembro)

Adreso: Esperanto Hospitalo,Universitato de Ekpoma,Ileh Ekpoma
Bendel Nigerio,Afriko
Profesio: Esperanta Kuracisto
Koncisa Kariero:B.A.Amaskomunikoj,Doktoro pri Filozofio kaj Medicina Kuracisto de Esperanto

S-ro Werner Schulz (1947.23.Aprilo)

Adreso: PSF 139, Marnitz 2851,GDR
Profesio:Meteorologo,nun ĉefo de Meteorologia Stacio
Koncisa Kariero: Liberterapa Okupiĝo: Pri Akupunktura Kuracado

S-ro Graziano Ricagno (1936.27.Septembro)

Adreso:Via Parma 83 I-46030 PIETOLE
,Italio
Profesio: Infan-Neurologo;Kuracisto
Koncisa Kariero: Antaŭe instruis ĉe Universitato dum 8 jaroj,nun laboras kiel neŭrologo por infanoj

S-ro Diego Hernandez Sanchez (1918.1.Aprilo)

Adreso: Str.Portallet No.12 - 43737
GRATALLOPS-Tarragona Spain
Profesio:Naturopata Doktoro (Emerita)
Koncisa Kariero: Doktoro pri la Universiad Medico Naturalista Hispano Amerikana.Miami Florida U.S.A

S-ro Pekka LEHTINEN (1937.10.Marto)

Adreso: Haavikontie 12,SF-33800 TAMPERE
,Suomi- Finnlando
Profesio: Komercisto
Koncisa Kariero: Amatoro (diletanto) je la temo "Kuracado Naturmetoda"

S-ro Puramo CHONG (1952.14.Julio)

Adreso: 50 - 2,KwangMyong 2 dong
,KwangMyong-shi,Kyonggi-do,Koreio
Profesio: Kuracisto de Orienta Medicino
Kariero: Doktoriĝis je Orienta Medicino

# Membrolisto de ENA

ESPERANTISTA NATURKURACISTA ASOCIO

1. s-ro Vilcjo Simcock el Britujo
2. s-ro Bosiljko Pejinovic el Jugoslavio
3. s-ino Getrud Weigelt el Svisujo
4. s-ino Josifa Rabino el Izraelo
5. f-ino Olive Bobotham el Britujo
6. d-ro Mancel Blaz Garcia el Brazilio
7. d-ro Puramo CHONG el Koreio
8. s-ro Christopher Pettes el Dublino
9. s-ro Ildo conti el Italujo
10. s-ro Levar Petar el Jugoslavio
11. s-ro Karl Nell el Usono
12. d-ro Carmel Mallia el Malto
13. s-ro Rev.Ronald C.Peries el Sri lanka
14. s-ro R.C Marble el Usono
15. s-ro Kees Ruig el Nederalndo
16. s-ro Joachim Werdin el Polando
17. d-ro Peco Vlahof el Bulgario
18. s-ro Abderrazak Tabka el Tunizia
19. s-ro Zbigniew zupkallo el Pollando
20. s-ro Tamas Andrassy el Hungario
21. d-ro Ivan liev Carnaev el Bulgario
22. s-ro Katalin Balough el Hungario
23. p-ro,d-ro Godwin L-Oboh el Nigerio
24. s-ro W.Schulz el rienta Germanio
25. s-ro Stawomir Ruszklewicz el polando
26. s-ro Hubert Schweizer el Germanio
27. s-ro Nsimba Mfumu Ndongala el Zairo
28. s-ino Lina Gardner el Britujo
29. s-ro J.Nikolov-Hoitsma el Nederlando
30. s-ro Graziano Ricagno el Italio
31. s-ro Antonio Goncales el
32. s-ino Eva Farkas-Tatar el Hungario
33. s-ro Hernandez Sanchez el Hispanio
34. S-ino Roan Orloff el Usono
35. s-ro Kataoka Tadasi el Cinio
36. s-ro Yu rui feng el Cinio
37. s-ro Sergej I. Anikejev el Sovet Unio
38. s-ro Alfredo Lara el Argentino
39. s-ro Walter Griesmeyerel Usono
40. s-ro Pekka LEHTONEN el Finnlando